27 SEPTEMBRO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) TRIA JARO. — Nº 16

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro . . . . Sm. **1.20** | Helpabono. . . . Sm. 4.—
Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = 1/2 dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj austr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).
Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)
Bulgara Eldono : N. B. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO
1 paĝo . . . . Sm. **100.—** || 1/4 kolono . . . Sm. 7.—
1 kolono. . . . » 25.— || 1/8 » . . . » 4.—
1/2 » . . . . » 13.— || 1/16 » . . . » 2.50
25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj
Ĝeneralaj Agentoj : G. Warnier, 46, Rue Sainte-Anne, **Paris-2e**
C. A. L. Browne, 53, Wych Street, **London W. C.**

ESPERANTAJ KURSOJ

Baldaŭ rekomenciĝos la Esperantaj kursoj kaj en ĉi . urbo, sub la pacienca gvidado de niaj sindonemaj profesoroj de Esperanto, ellaboriĝos novaj aroj da Esperantistoj, kies kelkaj, nur kelkaj bedaŭrinde, fariĝos siavice seriozaj apostoloj de nia afero. Sed ne pri tiuj ĉi mi deziras paroli, ĉar ili estas jam spirite kaj anime Esperantistoj, antaŭ ol ilin konvinkis la argumentoj de la gazetartikoloj aŭ la kleraj instruoj de la profesoro. En ĉiu kurso, troviĝas unu, du, tri tiaj personoj, kiuj poste daŭrigas sian laboron kaj fariĝas vere konsciaj Esperantistoj, sed kion diri pri la aliaj, pri la dekoj, centoj da homoj, kiuj ĉiujare partoprenas en niaj kursoj, studas dum kelkaj lecionoj, kaj poste forperdiĝas, sin detenas de ĉia agado ? Sendube, ili restas favoraj al nia ideo kaj iam venos al ni devigate de la cirkonstancoj, sed kion fari nun el tiu inercia amaso ? Ĉu ni rajtas konsideri ĝin kiel esperantista ? Mi tie ĉi ektuŝas demandon ĉefgravan, kiun konas ĉiuj personoj, kiuj okaze fariĝis instruantoj de Esperanto : Kiel konservi, se ne ĉiujn, almenaŭ la plej multajn lernantojn de niaj kursoj ? Kiel fari el ili verajn, seriozajn Esperantistojn ? Tio ĉi ne estas pure lingva afero. Kompreneble, la metodo de instruado devas esti elektata de la profesoro, tiamaniere ke ĝi estu kiel eble plej konforma al la grado de instruiteco de la lernantoj, ke ĝi ebligu al ili rapide skribi kaj paroli, kaj samatempe konatiĝi laŭeble kun la logikaj principoj, laŭ kiuj estas konstruita nia lingvo. Sed tio tute ne solvas la supran demandon, ĉar ofte ni renkontas personojn, kiuj flue parolas nian lingvon kaj tamen ne estas Esperantistoj. Ne, flanke de la pure lingva instruado, devas ekzisti ia esperantista edukado. Esperantismo ne estas ekskluzive lingvo, sed ankaŭ, almenaŭ en la nuna tempo, movado. Esperantisto ne nur estas tiu persono, kiu konas Esperanton, sed kiu, en la realeco, sin okupas pri Esperantismo, propagandas, uzas, praktikas nian lingvon. Sekve, se oni volas, ke la lernanto fariĝu vera Esperantisto, se oni celas lin konservi al nia afero — konservi estas tiel grave kaj malfacile kiel akiri — oni devas zorgi pri lia esperantisteco tuj ĉe la komenco. La tasko de la profesoro konsistas ne nur en tio, ke li komunikas al siaj lernantoj certajn konojn, sed ankaŭ en tio, ke li provas lin interesi rekte al nia afero, enradikigi en li Esperantismon.

Kiel interesi la novajn adeptojn ? Gis nun, oni montris al ili niajn librojn, jurnalojn, oni kuraĝigis ilin korespondi per nia lingvo, sed tiuj rimedoj tre ĝeneralaj neniel profunde impresas la spiriton de la varbitoj, sed nur distras kaj okupas ilin dum kelka tempo. Por trafi nian celon, por vere esperantistigi niajn rekrutojn, estas nepre necese, ke ili havu al Esperanto propran, *personan*, per la sperto *akiritan* intereson. La seriozaj Esperantistoj fariĝis tiaj nur ĉar ili spertis mem. Ni agu same kontraŭ niaj adeptoj. Ni al ĉiu el ili montru kiel Esperanto povos lin aparte interesi, en lia speciala fako ; ni vidigu al li kion li povas ricevi de Esperanto ne nur en ĝenerala vidpunkto, sed en aparta — ĉu profesia, ĉu idea — vidpunkto. Ni montru tion per ekzemplo. En la fino de ĉiu kurso, la profesoroj kutime klopodas, ke iliaj instruatoj aliĝu la lokan grupon, la nacian societon, k. t. p., sed flanke de tiuj utilaj organizajoj, ni ne forgesu, ke nun ekzistas jam multaj internaciaj *fakaj* societoj, en kiuj ĉiu povos trovi kampon de agado multe pli vastan, utiligadon de Esperanto multe pli rapidan ol en la propagandaj grupoj, ĉe kiuj la diverseco de anoj malhelpas, ke ili trovu personan intereson al Esperanto, ekster la propagandemo. Aliparte, tiuj fakaj societoj, ankoraŭ embriaj, bezonas vivon, agadon, tion ili havos nur se al ili aliĝas la novaj elementoj, kiuj fervorplenaj estas plej utilaj, se oni scias ilin uzi. Antaŭ ol esti Esperantistoj, niaj lernantoj estas homoj, diversideaj, diversmetiaj, diversrangaj ; ĉiu el ili havas ian specialan punkton sur kiu koncentriĝas lia atento ; ni montru al li kiel Esperanto helpos en lia fako, kaj nature, li uzos nian lingvon, li konatiĝos kun samfakanoj per Esperanto, li ĉerpos profiton de ĝi.

Aliparte, interesi ne sufiĉas. Ni provu montri al niaj instruatoj, kion ili kapablas fari por Esperanto nur aliĝante al faka societo kaj uzante praktike nian lingvon. Tro ofte, ni renkontiĝas kun personoj tre bonvolaj por Esperanto, sed tute malaktivaj, ĉar ili opinias, ke ilia individua, modesta agado utilas al nenio. Por forpeli tiun eraron, oni konigu iom detale la historion de la unuaj paŝoj de Esperanto, kiun tro multaj tute ne scias. Tiu historio estas por la lernantoj la plej interesa, ĉar ĝi blindige montras, kion povis faris kelkaj senfamuloj, agadante mem laŭ la manieroj, kiujn ili opiniis la plej bonaj kaj en la kampo, kiu al ili estis la plej alirebla.

Per unu vorto, estas bona profesoro ne nur tiu, kiu lerte instruas nian lingvon, sed ankaŭ kiu *konservas* siajn lernantojn kaj el ili faras aron da diligentaj kaj agemaj Esperantistoj. Por tion efektivigi, ni ilin interesu ne sole per la ideo — kiu konvinkas nur elektitan malplimulton — sed montrante la personan utilon, kiun ili havos per Esperanto.

Samcelano.

TRA LA MONDO

Brazilujo

Rio-de-Janeiro, Aŭgusto 1907.

Mi ŝatas, dum sencelaj promenadoj, lasi min konduki de la vaganta fantazio de l'vojetoj nekonataj. Kiel komprenema amatino la naturo rekompencas min pri tiu dolĉa konfido per la neatendita malkaŝo de siaj plej karaj belajoj kaj per mallaŭta instinkto ĉiam min alvenigas en loko plej favora por komunii kun ĝi. Tiel mi sencele iradis, dum tiu nokto, tra la nekonataj stratetoj de la urbego babilona kiu bruegas senĉese ĉirkaŭ la ŝipplena havengolfo, granda kiel maro, en la titana cirko da krutaj montegoj kiu kiel fortikaĵo giganta ĝin zonas. Intence mi forlasis la grandajn kvartalojn, la luksajn bulvardojn je mozaikaj trotuaroj, kaj riĉege fantazia arĥitekturo ; mi foriris de la placoj elegantaj, kiujn ornamas tiu tropika juvelo modernstila, la palmo milforma, jen alta kiel la flugo de l'aglo, jen densa kiel ombroplena nubo, ĉiam mirinda ; mi lasis la parkojn, je tiu horo fermatajn, kie inter revinda vegetaĵo kuras senĝene kaj sentime tuta la stranga bestaro, kiu por ni, eŭropuloj ne ekzistas ekster la muzeoj kaj vojaĝaj albumoj, kaj mi marŝadis, amuzata, sen laceco, tra la malnovaj kvartaloj, plenaj, tiun nokton de sabato, je dancantaj negroj aŭ kantantaj nigraj aroj kiuj « serenadis » sub la balkono de ia malluma belulino. Oni ja multe erarus, prezentante al si la Rio'an negron kiel faras la litografaĵoj. Prezentu male al vi sinjoron vestitan eŭrope, kun blanka, tre blanka tolaĵo, eble iom grandaj manumoj kaj kolumoj, sed resume tre deca vidaĵo kaj fierega mieno. Vere liaj blankaj gamaŝoj kun vaksitaj botetoj ne malpermesas al li kaprinsalti en la strato se plaĉas, nek gravege blovi en trombonegon kun altforma ĉapelo kaj moda redingoto por esprimi siajn amsopirojn al ravite aŭskultanta knabino ; ne, ne postulu tiom multe, tiuj « infanoj de la naturo » kiel diris la bona abato de St-Pierre, ŝanĝis nur la veston, sed la veston ja ili ŝanĝis, kredu min, kaj estas videble.

Al pli malriĉaj kvartaloj mi iris, kaj la luno supreniĝis, kaj la horo malfruiĝis, sed la vivado ne haltis kaj anstataŭ la klasika silento de la nokto mi ree aŭdis la noktan malhelan bruvibradon ja konitan, propran je la urbegoj. Base muĝis ia nevidebla potenca fabriko, kaj la malproksimaj fervojoj, kaj la sennombra aro da trakurantaj ĉaroj ; la fajfoj de lokomotivoj, la sirenoj de l'ŝipegoj, la krakado laŭta de la ŝarĝomaŝinoj, kaj supre la akra voĉo de ia kantisto aŭ de vekita koko, kaj mil nerekoneblaj bruoj plenigante l'aeron je sia konfuzega senordo, miksita, knedita en senhalte daŭra vibrado kiu dormiĝas la aŭdon tiel ke fine, pro ĝia forteco mem, ĝi ne plu aŭdiĝas de l'orelo kutimita kaj fariĝas ĥaosa silento.

Jam la domoj fariĝis malpli densaj. Mi supreniris strange torditan strateton, malpuregan, kotan kie ŝtonoj dise plantitaj montras la solan vojon sekveblan, saltante de unu al alia. La vojo plikrutiĝis kaj aperis la nuda rokaĵo de la altaĵoj, kaj mi pensis, ke mi sendube eliris jam el la urbo, kaj miris, ke nur post unuhora promenado mi tion sukcesis, dum laŭdire la urbo estis tiel granda ke dum horoj oni povas rektvoje veturi en elektra tramĉaro ne elirante el ĝia rondo. Subite ĉesis la strateto kaj la duobla vico de domaĉetoj kiuj al mi kaŝis la horizonton kaj, mirante pro surprizo, mi komprenis mian eraron : Mi estis sur nuda pinto, alte kaj krutege sin levanta super la urba ebenaĵo. Nur ĉe la flanko per kie mi venis, estis ĝi alirebla. Dekstre ĝi falis kapturniĝe ĝis la golfo kie sur la griza akvo lumita de la hela plenluno kuris la nigraj ombroj de la transoceanaj ŝipegoj, de tie grandaj kiel ludiletoj ; maldekstre, la stacidomo ĵetis al la ĉielo strangajn rubandojn de fumo blanka kiuj desegnis nekompreneblaĵojn sur la nigra amaso de la urbaj domoj. Kaj ĉirkaŭe ĝis la horizonto, sur tero kiel sur akvo, popolo de lumoj milione disŝutitaj, formantaj strangajn stelarojn kaj konfuzigante la okulon surprizitan. Jen la ruĝa fajro de uzinoj ardantaj, la skarlata okulo de la muĝantaj lokomotivoj, la viola diamanto de la tuboj Cooper-Hewett, la blua stelo de la arklampoj, la verda brilo de l'Auerlampoj, lumoj flavaj, oranĝaj, flankaj, fieraj aŭ humilaj, la fanaloj de la ŝipoj, kaj la potencaj projektoroj de la minacaj fortikaĵoj, festo de koloroj kaj briloj, mirinda ŝuto de ĉiuspecaj juvelŝtonoj, nekomparebla manifesto de kolosa vivado, ĉio ĉi sin entendis sub miaj surprizitaj rigardoj, kaj mi preskaŭ atendis, en tiu momento de raveco, ke aŭdiĝu la tenta voĉo : *tibi dabo...*

Anstataŭ ĝi voĉeto zumanta turniĝis al mi la kapon. Unue mi nenion vidis. Poste sur la griza ĉielo pasis flirtanta punktombreto. Tuj mi ektremis : kulo ! la teruriga transportanto de la flava febro ! eble jam li min pikis ! ve al mi !

— Nenion timu, diris la insekto, mi ne estas de tiu lando, mi venis hodiaŭ per vaporŝipo kaj mi la tutan tagon serĉis kunulon, samgentulon, sed mi ne povis trovi en la tuta Rio ! Mi penis viziti akvejon, la putojn kaj defluilojn, ĉiujn lokojn kie sin edukas la pinaj kulidoj, espero de nia raso. Sed ho ve ! mi trovis ĉion fermitan. Tie ŝtonoleo kovras la akvon, tie banderoloj de papero ŝtopas ĉiun elirejon, tie akra fumo... jes, estas ĉi tie la infero de la kuloj. Kaj pulo diris al mi ke la sorto de ĝia gento ne estas pli enviinda...

Efektive ĉi tie la milito al la danĝeraj insektoj energie kondukata laŭ la ekzemplo de *Cuba* insulo atingis admirindan rezultaton. Nia samideano Frederiko Geyer, la konata propagandisto de Esperanto en Brazillando, kiu inspektas ilian ekstermadon, donis al mi notindajn kaj trankviligajn detalojn. Sufiĉos scii ke de 4.852 en jaro 1894, la nombro de flavofebraj mortaj okazoj falis ĝis 42 en jaro 1906, kaj preskaŭ ĉiuj kazoj observataj estas de malgrava eco, dum antaŭe la malsano estis oftege mortiga. Tamen restas ankoraŭ multe por fari, precipe por doni al la popolaj klasoj konvenan loĝadon je tolerebla prezo.

Efektive, en ilia deziro tuj alligi sian nomon al neforgesebla reformo, la « Rekonstruantoj » de Rio komencis detruante grandan parton de la popolhava urbego, ĵetante teren malsanajn domojn kaj putrantajn kvartalojn kaj anstataŭe tuj konstruis tiujn belajn bulvardojn kaj placojn, kie neniu loĝas kompreneble, kaj la densega popolaro kiu tie vivis devis serĉi aliloken hejmon. Sed samtempe en la restantaj domoj oni faris rearanĝadon, cimentadon, purigadon tre laŭdindan sendube, sed kiu, kompreneble tute neebligas la loĝadon pro altiĝo de la prezo tute ne komparebla je la cetera kosto de la aferoj. Oni diras, prave, ke oni ne povas kompari la prezojn brazilajn kun la eŭropaj, pro la ega diverseco de l'monvaloro. Ekzemple tie ĉi la loka unuo. 1 milrejso = 625 spesoj. 1 milrejso ne valoras pli, kiel povo de aĉeto, ol 1 franko, aŭ eĉ malpli en Svislando. Sed la komparo inter la diversaj elspezoj en la sama lando gardas tutan sian valoron. Nu, komparante egalkomfortajn manĝojn kaj ĉambrojn en Rio kaj Genevo, ekzemple, laŭ mia sperto, mi povas doni la jenajn nombrojn.

	En Rio	*En Genevo*
tagmanĝo deca. .	$ 1 (62 Sd)	F. 2 (80 Sd)
ĉambro por unu nokto.	$ 5 (3,10 Sm)	F. 2 (80 Sd)

Oni vidas, ke tie la manĝo estas iom malkara, sed ke la loĝado estas kompare *kvinoble* pli kara. Kompreneble la inteligentaj Rio'anoj tion komprenis tuj de la komenco kaj nia agema konsulo en Rio, S-ro Everardo Backheuser, faris multajn artikolojn pri tio ; sed ilia voĉo perdiĝis en la bruo de la domdetruado kaj nenio estis farita por popolaj hejmoj.

De tio venas kutimaro iom stranga, kiu, en tiu tropika tero, memorigas pri rusaj moroj. Multope en sama domo loĝas la familioj, kun unu komuna lernejo kaj kuirejo. Nenio pli amuza ol tiuj komunaj kuirejoj kie ĉiu virino havas sian apartan fornon kaj devas prepari sian nutraĵon apud la aliaj. Blankula kaj nigrula kuirarto tiel najbaras. ne sen malprofito por unu aŭ ambaŭ. Kiel oni komprenas ne malofte okazas inter la kuiristinoj malpacoj iom akraj, kiuj estas la gajego de la domanaro. En unu sama ĉambro loĝas du, tri, ĝis kvin kunuloj kiuj pagas onon de la luprezo. Mi havis la plezuron esti enkondukata en unu el tiuj « respublikoj » formataj de studentoj. Tiuj ĉi ne nur pri loĝado sin komuniste aranĝis, sed ankaŭ pri manĝado kaj laktotrinkado, tre grava parto de la Brazila nutrado. La ordo estas perfekta kaj en la komuna ĉambro, ĉiu estas hejme, kiel se la aliaj ne ekzistus. Tiu ĉi modo de vivo povas havi siajn bonajn flankojn, sed oni facilege vidas la malbonajn.

* * *

Kiel disvastiĝas Esperanto en Rio ? La unua impreso estas favorega. Mi skribas tiun artikolan en la Centra ejo de la « Brazila Klubo » tuj post la unua kongreso brazila de Esperantistoj. Tio ĉi estis sukceso nekredebla en lando kie, antaŭ unu jaro, nia lingvo estis nenio. Mi ne

priskribos ĝin, miaj legantoj nun legis sendube jam pri la Kembriĝ'a kongreso aliajn mirindajojn. Sufiĉas diri ke ĝi daŭris ok tagojn, ke ĉeestis multaj personoj tre gravaj inter kiuj ministro de Internaj aferoj, kaj ke la publiko atingis iam ĝis mil personoj ! Plenan raporton la scivolemuloj povos legi en *Brazila Revuo Esperantista*. Diversaj grupoj ekzistas tra la grandega imperio, kaj rimarkinda estas la bona elparolado de tiuj, kiujn mi vizitis. La Brazilanoj, kies dua nacia kongreso okazos la 21an de Julio 1908 en Saô-Paulo, tre deziras kaj estas certaj ke post kelkaj jaroj ili kunvenigos en sia ĉefurbo universalan kongreson de Esperantistoj : ĉi tiuj havos la okazon vidi tiam neforgeseblan vidajon, kiu sola valorus la vojaĝon, sed esperu ni ke tio ne okazos antaŭ kiam la prezoj de loĝado estos ĉi tie pli atingeblaj por la ne-milionuloj.

Paul BERTHELOT.

Granda Britujo

Londono, Septembro 1907.

Dum tiu ĉi tempo, la publiko timas, ke okazos ĝenerala striko de la fervojistoj. Grava malkonsento naskiĝis inter la kompanioj kaj iliaj oficistoj. Tiuj ĉi lastaj postulas, unue ke la kondiĉoj de ilia laboro estu plibonigataj, due ke la kompanioj oficiale rekonu ilian asocion. Pri tiu ĉi punkto, la interkonsento estas plej malfacile atingebla. La sindikato formita de la fervojistoj, sub nomo « Amalgamated Society of Railway Servants » enhavas proksimume 97.000 anójn inter 580.000 oficistoj en la diversaj fervojoj. La kompanioj rifuzas akcepti la supran kondiĉon, ĉar ili ne volas ke tria aŭtoritato miksiĝu en la malkonsentoj kun la oficistoj kaj ĉar, se la kompanioj rekonus oficiale la « Amalgamated », tiu sindikato akirus tre gravan potencon kaj al ĝi aliĝus preskaŭ ĉiuj fervojistoj. Deputato Richard Bell, sekretario de la sindikato, estas la ĉefo de la laboristoj kaj jam de kelkaj monatoj diskutas kun la kompanioj, kiuj ĝis nun rifuzis ĉiujn postulojn. En lasta kunveno, Richard Bell proponis la strikon, meze de granda entuziasmo. Pri tiu propono voĉdonos la oficistoj kaj se ĝi estas akceptita, oni povas antaŭvidi, ke ĝi daŭros, ĉar la sindikato havas financajn rimedojn, per kiuj ĝi povas elteni dum du aŭ tri monatoj sen monhelpo de la aliaj laboristaj sindikatoj. La situacio nun estas tia kaj jam en la Borso la akcioj de la kompanioj iom malplikariĝas, kio montras la timon pri striko kaj rezultonta ekonomia konfuzeco en la lando. La registaro estas senpotenca kontraŭ tia stato, ĉar la kompanioj ne deziras arbitracion.

L. H. G.

Kanado

Toronto, Septembro 1907.

Kanado estas unu el la plej gastemaj landoj kontraŭ la enmigrantoj. Tio ĉi eĉ kostas al ĝi sufiĉe kare. Ne nur ĝi ne postulas de ili monon kiel en Unuigitaj Statoj, sed ankaŭ ĝi pagas parton de la tralanda vojaĝo de la Britaj aŭ Irlandaj enmigrantoj, laŭeble monhelpas ilin kaj favoras ilian enloĝiĝon, sed la Azianojn ĝi jam ne volas, ĉar ĝi opinias ke ili fariĝis nacia danĝero. Ne ekzistas leĝo malpermesanta la enloĝiĝon de la ĥinoj, sed, laŭ regularo, ili devas pagi 500 dolarojn (1000 Sm). La Japanoj nenion pagas, kvankam oni ilin akceptas malpli volonte ol la ĥinojn. Laŭ letero sendita de S-ro deputato Mac Pherson al ministro W. Laurier, dum la unuaj ses monatoj de 1907, 4000 Japanoj elŝipiĝis en Brita Kolombio ; tiu provinco enhavas 20.000 ĥinojn, 8.000 Japanojn, 2.000 Hindojn. En unu jaro, la plej multaj lignolaboristoj blankaj estis anstataŭitaj de Japanoj, tiel ke nun laboras nur 5 % da blankuloj. Tiuj Japanoj plej ofte veturas kun siaj familianoj. Viaj legantoj jam eksciis pri la bedaŭrindaj tumultoj okazintaj en Vancouver, kie la Japanoj estis atakitaj kaj multaj butikoj detruitaj. Resume, en nia lando sin prezentas la sama demando kiel en najbaraj Unuigitaj Statoj, sed ĉar Granda Britujo havas kunligan traktaton kun Japanujo, oni komprenos, ke el tio povas rezulti politikaj komplikajoj. Estas vero, ke Japanujo ne kuraĝigas la elmigradon al Ameriko, sed tre preferus, ke ĝiaj enlanduloj ekloĝu en Manĝurujo au Koreujo ; tamen, malgraŭ tio, la allogo de la Amerika tero por la Japanoj estas tre granda kaj kredeble, por garantii la rajtojn de la enlanduloj mem, nia registaro estos pli-malpli frue devigata leĝigi kontraŭ tiu fluo de troa enmigrado, kiu tre malfaciligas la kondiĉojn de vivado de la nunaj laboristoj blankaj.

H. G. D.

Unuigitaj Ŝtatoj

Sekve de la artikolo de nia korespondanto, el Unuigitaj Statoj, ni ricevis la jenan leteron :

Newton Centre, Mass. Septembro 1907.

Antaŭ kelkaj tagoj, okaze enfalis en miajn manojn, la 12a numero de via bonega eldonajo. Pri la enhavata letero de Usono, kiu ŝajnigas priskribi la ĉi tieajn kondiĉojn, mi ne estus amerikana urbano se mi ne protestus kontraŭ la malvera kaj malĝusta reprezentado de mia lando. Estas vere ke San Francisco estas malbonega urbo, eble la plej malbonega en la lando, sed tiu urbo neniel pli estas tipo de amerikana urbo, ol la amaso de enmigrantoj, kiuj venas al niaj bordoj, estas tipoj de la diversaj nacioj de kiuj ĝi venas. Po ĉiu urbo de ĉi tiu tipo, estas milo'da honeste regataj, puraj urboj, kaj dekmilo da urbetoj kaj vilaĝoj en kiuj la kondiĉoj de vivo estas idealaj, kaj kie malriĉeco kaj krimo estas preskaŭ nekonataj. Laŭ nia konstitucio la popolo regas, kaj, tial, urbo estas tia kia ĝia loĝantaro ĝin faras. Al la novaj partoj de la lando aliras la amaso da maltrankvilemaj, aventuremaj, kaj nekonfidindaj urbanoj, kaj, en la frua historio de la tieaj fonditaj urboj estas kelkfoje plimalpli da senleĝemeco, sed, kiam ili pliaĝiĝis, ĉi tiuj kondiĉoj sanĝiĝas, kaj ili fariĝas leĝokonservantaj komunumaroj. Estas vere ke en la plej grandaj urboj, kie la fremda loĝantaro estas la plej granda, kaj kiuj estas la natura celo de la miloj da nekulturitaj enmigrantoj, oni ne nepre trovas idealan registaron urban, sed kompare kun la tuta urbaro, ĉi tiuj estas nur malgranda parto de la lando. Nenie en la mondo estas loko por la mallaborema viro, kaj malpli el ĉiuj U. S. metas panon en la buŝojn de tiaj. Sed, ni vivas en lando de senlimaj rimedoj kaj okazoj, tiel grandegaj, kaj tiel senlimaj, ke citi ilin plenigus gazeton multfoje pli grandan ol via tuta eldono, kaj estus tromenfideco, peni per mallonga artikolo, doni ideon de mia lando, sed, parolante pri Nova Anglujo, kaj la granda Oriento, mi neas ke nia lando estas kiel via artikolo pentras, kaj mi jesas ke nenie en la granda mondo la laboristo povas fari per si mem tiel bonan kaj kontentigantan hejmon, sub pli favoraj kondiĉoj, aŭ estas donataj al li tiom da okazoj altigi sin per siaj propraj penadoj, ĝis komforto kaj eĉ riĉeco.

C.-H. TESSENDRIE.

Tutmonda Kroniko

31 Aŭgusto, Teheran. — Oni inside mortigas G-lon Atabek-Asam, viziro.

1 Septembro, Berlino. — Alveturo de la Etiopia misio.

Tanger. — Raisuli ekmarŝas kontraŭ la urbo.

2, Triesto. — Gravaj manifestoj de la Slovenoj kontraŭ la Italoj.

3, Odessa. — Pogromo kontraŭ la Izraelidoj kaj studentoj.

Antverpeno. — La strikantoj de la dokoj ekbruligas la tenejojn.

Casablanca. — La Marokoj atakas la urbon, sed estas forpelitaj. Mortas komandanto Prevost.

4, Bergen. — Mortas Edvardo Grieg, la granda nacia muzikisto Norvega.

5, Bolonjo. — Mortas S-lo Mirri, eksministro de milito.

6, Marienbad. — Reĝo Edvardo VIIa akceptas Grafon Iswolsky, rusa ministro de l'eksterlandaj aferoj.

7, Semmering. — Pasiĉ, estro de la Serba ministraro, vizitas baronon Aehrenthal.

Parizo. — Mortas poeto Sully-Prudhomme.

Konstantinopolo. — Brulado detruas 100 domojn.

Venezio. — La Rusa grafo Kamarowski estas inside mortigita de Naumow.

Peterburgo. — Krivocheine estas elektita ministro de l'internaj aferoj.

8, Praho. — Malfermo de la Internacia Kongreso de Libera Penso.

9, Munĥeno. — Malfermo de la 16a internacia Paca kongreso.

10, Romo. — Publikigo de konsento inter Vatikano kaj Rusujo pri la instruo de la Rusa lingvo en la Polaj seminarioj.

11, Finlando. — La vaporŝipo de la Caro *Standard* surteriĝas.

Casablanca. — La Franca soldataro detruas la Marokan tendarkampon de Teddert.

12, Sofio. — Inaŭguracio de monumento al caro Aleksandro IIa.

13, Nov-Jorko. — La vaporŝipo *Lusitania* trairas Atlantikon en 5 tagoj kaj 54 minutoj.

15, Kristianio. — Internacia kongreso de la sindikatoj de la laboristoj.

Québec. — Fervoja ektuŝego ĉe Withe-Rives-Yunction ; 20 mortintoj.

Romo. — La papo publikigas enciklikon kontraŭ la modernismo.

A. TELLINI.

NIA ENKETO

LA KOSTO DE LA VIVADO

Ni komencas publikigi en tiu ĉi N° la ĉefajn rezultatojn de la 2a serio de nia enketo pri la ĝenerala kosto de la vivado en la diversaj landoj. Oni rememoras, ke ni demandis niajn legantojn pri la prezo de la loĝado, de la vestaro kaj meblaro, de la instruado kaj pri la kosto de la impostoj ; plie, ni petis, ke oni starigu budĝeton de laborista familio da tri personoj. Ni tiamaniere ricevos sufiĉe klaran ideon pri la mezaj elspezoj necesaj por la vivo. Kompreneble, kiel iam estis dirite pri la 1a serio, oni en tiu temo ne povas atingi certan precizecon, ĉar la demando estas treege vasta, ĉar la kosto de la vivado varias ne nur laŭ landoj, sed ankaŭ laŭ regionoj, laŭ urbo kaj kamparo ; por faciligo en la priserĉoj, ni resumis la rezultatojn de tiu esplorado laŭ landoj — divido iom arbitra, sed oportuna. Ni tie ĉi permesas al ni danki sincere ĉiujn personojn, kiuj bonvolis sendi al ni informojn kaj zorge faritajn dokumentojn por nia enketo, farita tute *per* Esperanto kaj dank'al ĝi.

⁂

Francujo. — *Loĝado.* — En la urboj, kiel Nancy, Nantes, Bordeaux, la prezo de la apartamentoj varias de 50 ĝis 100 Sm. [1]) po ĉambro kaj po jaro, laŭ kvartalo kaj lukseco. En la tre grandaj urboj (Parizo, Lyon), la prezo de la luksaj ĉambroj altiĝas ĝis 150 kaj 180 Sm., en tiuj samaj urboj, oni trovas malkarajn loĝejojn por laboristoj, sed en tre malhigienaj kvartaloj po 20 aŭ 30 Sm. po ĉambro. En la malgrandaj urboj, la loĝado estas pli malkara. En Bourg (20 000 loĝantoj), oni trovas ĉambron po 20 Sm. jare kun ĝardeneto. Apud Parizo, en Hericy, Valence-en-Brie, Nangis, dometo kun ĝardeneto kaj fruktarboj kostas 40 Sm. jare ; en urbetoj kaj vilaĝoj, kiuj estas ne proksimaj al fervojoj kaj grandaj urboj, oni trovas kvarĉambran dometon kun ĝardeno kaj kampeto po 30 ĝis 60 Sm. jare, laŭ la lokoj kaj iliaj komunikado kun la urboj. En insulo Corse kaj en marbordaj departementoj, kvarĉambraj domoj po 60 ĝis 80 Sm. (tre bona klimato).

En la hoteloj, la prezoj de unu ĉambro varias de 1 ĝis 2 Sm. en la urbetoj, kaj de 2 ĝis 5 Sm. en la grandaj urboj. La gaso kostas ĝenerale 8 ĝis 12 Sd. po metro kaj la elektro de 3 ĝis 5 Sd. po hektovato.

Vestaro kaj meblaro. — Ili tre varias. En la urboj, laborista kostumo kostas ĉirkaŭ 10 Sm ; urba kostumo de 25 ĝis 40 Sm. (ĉemizo 1 Sm. ; ŝuoj 3-5 Sm). Plena meblaro ne luksa kostas de 100 ĝis 200 Sm.

Instruado. — La instruado estas senpaga en tuta Francujo por la ŝtataj unuagradaj (popolaj) lernejoj kiel por la universitatoj. En la duagradaj lernejoj (kolegioj, liceoj), la eksteruloj pagas laŭaĝe 25 ĝis 100 Sm, jare la internuloj 160 ĝis 250 Sm. (kun la nutrado).

Impostoj. — Tre diversaj kaj multenombraj. La plej karaj, kvankam la plej neeviteblaj, estas la nerektaj. Rektaj impostoj : laboristoj senbienaj pagas $^1/_2$ Sm. jare, plie 3.50 Sm por la vojoj ; proksimume 10 ĝis 15 % de la luprezo ; malgrandaj bienposedantoj pagas ĉirkaŭ 10-12 Sm. ; plie estas departementaj kaj komunumaj impostoj, varieblaj. Resume, oni pagas kiel impostojn ĉirkaŭ $^1/_8$ ĝis $^1/_9$ de la saljaro.

Resuma budĝeto. — Kiel ekzemplon, ni konsideras laboristan familion el 3 anoj : gepatroj kaj 1 infano. Tia familio povas vivi en la vilaĝoj kaj urbetoj per 450 ĝis 500 Sm. en bonaj kondiĉoj (loĝado 40 Sm. ; nutrado 280 Sm. ; vestado 80 Sm. ; diversaj 50 Sm.). En la urboj (ekz. Nancy, Nantes, Lille), ĝi povus vivi per 700 ĝis 800 Sm. preskaŭ sen ia ŝparo (loĝado 125 Sm. ; nutrado 400 Sm. vestado 120 Sm. ; impostoj 8 Sm. ; diversaj 40 Sm.). En Parizo kaj en la tre grandaj urboj, tia budĝeto ebligas nur tre malfacilan vivadon. Tripersona familio laborista bezonas almenaŭ 1000 ĝis 1500 Sm. jare. Por vivi en bonaj kondiĉoj, tripersona burĝa familio bezonas 2500 ĝis 4000 Sm.

(daŭrigota).

[1]) Ni montras la prezojn per la internacia helpa mono. Ni rememorigas, ke 1 spesmilo (Sm.) = frankoj 2.50 = 2 ŝilingoj = 2 markoj = $^1/_2$ dolaro = 1 rublo = 2. 40 kron. Aŭstr. = 1.80 kron. Skand.

ESPERANTO PRAKTIKA

Nia Enketo-Konkurso

Jen la rezultatoj de nia *Enketo-Konkurso* (2a serio). La personoj kies nomoj sekvas, ricevis la promesitajn premiojn : 1. S-roj A. Kobylinski, Varsovio (botelo de likvoro Esperantine) ; 2. Boucon, Annecy (botelo de ŝaŭmanta vino Mirinda) ; 3. L. Bernhard, Düsseldorf (same) ; 4. C. A. L. Dirac, Bristol (botelo de vino Mercurey) ; 5. Dimitroff, Hermanli (same) ; 6. Maksimov, Bobrov, Rusujo (arta portreto de D-ro Zamenhof) ; 7. V. L. Giercuszkiewicz, Nowy Sacz, Galicio (same) ; 8. J. Heripret, Taillette ^{v}/Rocroi (same) ; 9. P. Christaller, Stuttgart (same) ; 10. Mery, Versailles (luksa pinglo Esperanto) ; 11. D-ro Saquet, Nantes (same) ; 12. Pierre, Barcelono (same) ; 13. Hedström, Rsssön (kolekto da Esperantoj libroj) ; 14. Uitterdyk, Hilversum (same) ; 15. L. Perry, Chester (same). Al ĉiuj aliaj respondintoj ni sendos pakajon da poŝkartoj aŭ ian suprizan produktajon de marko Esperanto. La ekspedo de la premioj estos farata en monato oktobro.

GVIDLIBROJ EN ESPERANTO

La eldonado de Esperante redaktitaj gvidlibroj estas plej grava punkto en la praktika disvastigo de Esperanto. Ni ne bezonas insisti pri la multaj utilajoj, kiujn al Esperantisto vojaĝanta liveras gvidlibro en Esperanto citanta la ĉefajn vidindajojn de la loko, kiun li vizitos, kaj donanta al li la plej necesajn unuajn informojn ĉe lia alveno en urbo nekonata kaj fremdlingva. Ni ankaŭ ne bezonas insisti pri la utileco de tiaj eldonajoj por nia propagando ĉe la hotelistoj kaj diversaj aferistoj kiuj ne volos lerni lian lingvon antaŭ ol ili havos Esperantistajn klientojn, kiujn al ili celas doni la gvidlibroj ; tiuj gvidlibroj estas bonega pruvo de la jam granda disvastiĝeco de nia lingvo kaj de la servoj, kiujn la praktikistoj povas jam nuntempe ricevi de ĝi, se ili scias ĝin utiligi. Fine, ĉu necesas rimarkigi, kiel bona reklamilo kaj diskonigilo estas por la priskribitaj regionoj ia Esperanta gvidlibro, kies ekzempleroj estos dissendataj al ĉiuj niaj Oficoj, konsulejoj, informejoj, k. a., montrataj en la kunvenoj, disdonataj en la ekspozicioj, afiŝataj ĉe la afiŝejoj de la Oficoj ?

Tion ĉi jam bonege komprenis kelkaj Esperantistoj, kiuj eldonis aŭ eldonigis gvidlibrojn de sia regiono. En la ekspozicio de la kongreso Kembriĝa ni kun ĝojo konstatis, ke la nombro de tiaj eldonajoj pligrandiĝis kaj ke ni povas nun elmontri kolekteton de belaj, Esperante redaktitaj gvidlibroj. Antaŭ ol citi la ĉefajn el ili, ni deziras kelkvorte diri, kiel, laŭ nia opinio, la eldono de tia libreto estas efektivigebla. Tiun entreprenon kompreneble prenas sur sin la Esp. Ofico, Konsulejo aŭ Informejo, kun la helpo de la tiea grupo, se unu estas. Ni konsideras, ke tiu afero devas esti unu el la unuaj faroj de la Esp. Ofico, la unua signo de ĝia vivo kaj agado. Por la eldono, ĝi devas antaŭ ĉio klopodi al la societo, kiu en ĝia loko sin okupas per la priprosperigo de la regiono kaj tiucele eldonas en diversaj naciaj lingvoj reklamilojn, gvidlibrojn, k. t. p. (Iniciataj sindikatoj en Francujo, societoj por pliprosperigo, hotelistaj asocioj, Verkehr, k. t. p.). Oni povas tute simple esperantigi la gvidlibron de tiu societo, ĉu publikigante aparte la tradukon, ĉu aldonante ĝin al la nacilingva teksto, tiel ke la broŝuro estu legebla de neesperantistoj ; se, kiel ekzemple okazas pri la malgravaj lokoj, oni ne povas publikigi plenan gvidlibreton, oni eldonu simplan folieton kun la ĉefaj necesaj informoj. Por ricevi la helpon de tia supre nomita societo, oni konigu al ĝi la profitojn, kiujn prezentas tia eldonado. Efektive, ĉiun gvidlibron la eldonanta Esp.-Ofico devas sendi po kelkaj ekzempleroj al ĉiuj Esp.-Oficoj en la mondo ; tiuj Esp.-Oficoj promesis ilin disdoni laŭ peto, traduki nacien al la dezirantoj, elmontri en siaj afiŝejoj, en la grupoj, kursoj, kunvenoj, ekspozicioj, k. t. p. Tio estas por ia regiono propagando, kiun oni alimaniere ne povus fari. Oni komprenas, kiel grava estas la apogo de tiuj societoj, ĉar, krom tio, ke ili havas grandan influon al la aferistoj kaj hotelistoj, ili ne ŝanceliĝas elspezi kelke da mono por eldonajo, kiu konigos ilian regionon. Tiuj societoj povas aŭ preni sur sin la tutan eldonadon de Esperanta gvidlibro aŭ doni por ĝi subvencion. En la okazo, se la monhelpo de tiaj societoj estas neebla, la Esp.-Ofico entreprenu mem la aferon kaj tion ĝi povos fari sen deficito, se ĝi enmetas anoncojn en la gvidlibron. Oni sin turnu al la negocistoj kaj proponu al ili reklamojn ; la sperto montris, ke ili ne rifuzas, kaj per tiu maniero oni povas egaligi la preselspezojn per la anoncenspezoj ; kompreneble, laŭ la kondiĉoj, oni povas eldoni pli-malpli modestan broŝureton, kun aŭ sen ilustrajoj, sed estas nepre *necese*, ke la Esp.-Ofico, Konsulejo aŭ Informejo eldonu *ion*, per kiu la Esperantisto vojaĝanta aŭ vojaĝonta povos ekscii la plej urĝajn informojn

Jen la gvidlibroj, kiuj laŭ nia scio, jam aperis en Esperanto : La Esperanto-Ofico de *Bourg* (Francujo) eldonis belan gvidlibron de *departemento Ain*, kun la helpo de la Iniciata Sindikato. Presita sur luksa papero, kun multaj ilustrajoj, tiu gvidlibro estas vere imitinda modelo. Sur la unuaj paĝoj, oni trovas informojn pri la Esp.-Ofico de Bourg, kiu posedas filiojn en la ĉefaj lokoj de la departemento Ain ; se iu, nescianta la francan lingvon, deziras skribi al iu el tiu departemento, li simple skribu Esperante sian leteron kaj sendu ĝin al la Esp.-Ofico, kiu tradukos kaj respondos. Karto kaj plano montras la lokon de tiuj Oficoj kaj de la vidindajoj, tiamaniere ke la vojaĝanto tuj povos viziti la Oficejon, kie li trovos ĉiuspecajn informojn. La Esp. Oficoj de *Le Creusot, Chalon* kaj *Beaune* eldonis simplan folion, sur kiu oni trovos ĉiujn dezireblajn informojn kaj liston de diversfakaj personoj, al kiuj oni povos sin turni por sciigoj.

Sub titolo *Du mirindajoj* aperis bele ilustrita gvidlibro de fama Franca Loko *Mont-St-Michel* (publikigita de la Fervojoj okcidentaj) ; la teksto estas en franca kaj Esperanta lingvoj.

La anoj de la 2a kongreso rememoras la belan gvidlibron *Tra Berna Oberlando*, eldonita de S-ro Hopf ; alia reklamfolio aperis : *Kien iri dum somero kaj vintro ? En Oberland'on Bernan* (Svisujo).

Niaj Anglaj amikoj aperigis belegan vidajaron de *Skotlando* kun plena gvidlibro en Esperanto ; la klarigoj de la ilustrajoj aperas angle kaj esperante. La mirinda loko *Blackpool* (Lancashire) ankaŭ havas sian Esperante redaktitan oficialan gvidlibron kaj sub titolo *Senkompara regiono por turistoj* ekzistas Angle kaj Esperante kun belegaj vidajoj kaj ĉiuspecaj klarigoj priskribo de regiono Yorkshire. Fine, ĉiuj kongresanoj posedas la libron *Londonaj Interesajoj*, utilega gvidilo tra Londono. Ankaŭ citindaj estas la gvidlibro de la Franca regiono *Velay*, kaj, en tiu rilato, la belega afiŝo de urbo Valencia pri la lastaj juliaj festoj k. t. p.

⁂

Ni esperas, ke ĉiuj Oficoj, Konsuloj, Informejoj, grupoj, k. t. p. sekvos tiujn *imitindajn* ekzem-

plojn kaj ke baldaŭ ekzistos dika kolekto de gvidlibroj. Al la personoj, kiuj deziras entrepreni tian aferon ni volonte sendos la sciigojn, kiujn ili povus bezoni. Plie, al ĉiuj petantoj ni sendigos ekzempleron de unu el la supraj gvidlibroj. Ni ankaŭ petas, ke oni konigu al ni ĉiujn aperintajn eldonajojn en tiu ĉi fako.

H. H.

LA TRIA KONGRESO

(Sekvo)

Mia Vojaĝo al la Tria

Mi estas konvinkata, ke estis bona, feliĉa penso de mi, viziti dum mia vojaĝo al kongreso la grupojn kuŝantajn ĉe mia vojo. Mi devas konfesi, ke la tagoj vivitaj kun la anoj en la tuŝitaj urboj estas nesekiĝonta fonto, ne nur de granda plezuro, sed eĉ de valora instruo. Certe estas ĉiam ĝojo koniĝi kun samideanoj; tio vidiĝis ĉe ĉiuj kongresoj, kaj tiu sento estas ankoraŭ pli varma, se oni trovas tian amikan akcepton, kiel mi ĝin ĉie trovis.

Unue en Bremeno mi kunvenis kun kelkaj anoj de l'tiea grupo. La grupo estas nun nur malgranda, la tero semota, t. e. la Bremena komercistaro kun tre konservativa pensmaniero estas iom ne impresebla de novaj influoj precipe se ili estas tiel progresemaj kiel Esperantismo. Eble estas atendote, ke, se ankaŭ la kalkulanta komeristo ektrovos la financan utilon, kiun sendube alportas unu internacia lingvo, tamen li kontraŭstaros ankoraŭ longtempe la internajn homarajn principojn de la Esperanta ideo. Ĉefe nun nur la profita flanko de nova ideo povas allogi la komerciston; ĝia spirita valoro estos ŝatata dum venontaj jardekoj nur de malmultaj idealistoj. Ĉar en Bremeno, la tero estas ĝenerale tiel ŝtonega, la semantoj ne devas ĉesi serĉi la malmultajn terpecetojn fruktportontajn. Estis kontentiganta sento trovi en S-ro Hoen, el Düsseldort, junan komerciston, kiu unuigas en sia agado ne nur la komercan praktikecon, sed eĉ la fervoran sindonemecon al la alta idealo de Esperanto. La Esperanta movado ŝuldas al li jam multajn sukcesojn en Rejnlando; pli multajn ni povas de li esperi. En Kolonjo (Köln), la movado ne jam estas forta, sed esperéble la bona ekzemplo de la najbara Düsseldorfa grupo baldaŭ vivigos ĝin. Valoran pruvon por la jam nuna utileco de Esperanta donis al mi en Kolonjo la sciigo de komercisto el Amiens, ke li ŝuldas tre gravajn komercajn rilatojn al nia lingvo.

Nia plej proksima celo estis Bruselo. En la stacidomo atendis nin S-ao Chalon, la agema sekretario de la vigla grupo « Pioniro ». Ke la societo portas rajte sian nomon, mi sciiĝis laŭ la fervoro kaj lerteco, kiujn ĝi montras, tiel per la flegado de amika kunvivado en la kunsidoj kiel ankaŭ per la varbo de novaj anoj. La grupo aranĝis specialan kunvenon por saluti la germanajn anojn. Amikaj paroladoj, deklamadoj, k. t. p. donis al ni agrablan pruvon de la uzebleco de nia lingvo kaj de la amika bonsento, kiu plenigas la korojn de la Bruselaj anoj kontraŭ la fremduloj: S-ro Chalon vizitigis al ni la urbon kaj kondukis al interesa vizito al Reĝa instituto por blinduloj kaj surd-mutuloj. Surprize la institutestro, frato Isidoro, salutis nin en flua Esperanto kaj klarigis al ni la organizon de tiu benplena instituto. En ĝusta ŝato de l'senfina beno, farita al la kompatindaj blinduloj per la internacia lingvo, oni instruas Esperanton jam al la knaboj; tiel, okjaraj knaboj jam scias legi flue Esperantajn librojn kaj ĉiuj respondis ĝuste niajn demandojn. La sekvantan tagon ni vizitis Antverpenon. La tieaj samideanaj konkuris kun la Bruselaj amikoj koncerne la amindeco. S-roj van Schooz kaj Swagers montris al ni la vidindajojn. La A. grupo uzas tre efikan propagandilon, aranĝante gastotablojn en diversaj partoj de l'urbo en kvar vesperoj semajne. Ĉe tiaj gastotabloj la anoj parolas nur Esperante dum la ludado de kartoj, bilardo, k. t. p. Tiamaniere oni ekscitas bonege la atenton de neesperantistoj. Ni rekomendas tiun ĉi propagandon al ĉiuj grupoj. La viva parolo, la lingva bonsoneco devas ĉiam varbi novajn amikojn al nia afero. Per la afableco de la diritaj samideanoj mi ĝuis la plezuron ĉeesti gastotablon, kies vivplena, muzika kaj parola amuzo apartenas al la plej belaj kaj neforgeseblaj travivajoj de nia vojaĝo.

En Calais, mi spertis, ke la popolmigrado al la ĉefurbo de Esperantujo jam komenciĝis. Tie la akcepto per la Francaj fratoj estis vere aminda. Ni povis konstati, ke oni sentis veran ĝojon vidi Germanajn anojn, ĉar tre malofte Esperantistoj el Germanujo vizitis Francujon. Estas apenaŭ necese diri iom pri la agema Bulonja grupo, ĉar en tuta Esperantujo la eminenta agado de S-ro Michaux kaj la fervora kunlaborado de ĉiuj anoj estas sufiĉe konataj. La vaporŝipo poste alportis kelkajn centojn da Esperantistoj el ĉiuj kontinentoj, landoj, al la gastamaj bordoj de Anglujo. El multaj buŝoj ni aŭdis la certan atendon festi la kvaran kongreson en Germanujo, kaj tiu ĝoja atendo, kiel la simpatiplena akcepto ĉe ĉiuj fremdlandaj samideanaj nin instigis voĉdoni por la entrepreno de tiu ĉi honora kaj laborplena tasko en nia lando. La ĝojega aplaŭdo, kiun ekscitis la invito de D-ro Mybs en Kembriĝo konstatigis la verecon de miaj observoj. Kaj nun mi finas mian raporton kun la en Kembriĝo milope aŭdita alvoko: ĝis la revido en Germanujo! En tiu ĉi loko, mi esprimas mian plej koran dankon por la bona akcepto preparita al ni de la geamikoj en Belgujo, Francujo kaj Anglujo.

W.-A. Vogler (Hamburgo).

ESPERANTO ĈE LA PACA KONGRESO

Esperanto jus ricevis gravan sukceson ĉe la 16a Paca Kongreso en Munĥeno.

Jen laŭ « Frankfurter Zeitung » resumo de la diskuto:

Pri la demando de Internacia Lingvo estas la tri jenaj proponoj:

1. — Konforme al la rezolucioj akceptitaj de la 1a Paca Kongreso kaj al la rezolucioj akceptitaj de la 9a kaj 14a Kongreso, la 16a Kongreso esprimas la deziron, ke *Esperanto* estu instruata en la lernejoj kaj ke la Berna konstanta Oficejo konigu tiun deziron al la registaroj.

2. — Por eviti la grandajn malfacilajojn kaj tempoperdojn, kiuj en la internaciaj kongresoj okazas pro la diverslingveco kaj kiuj, malgraŭ ĉiuj ĝis nun akceptitaj ŝanĝoj en la regularo estas tiel senteblaj en la Paca Kongreso, la Kongreso decidas, ke de la proksima kunsido *Esperanto* estu uzata kiel kongreslingvo kaj ke la paroladoj en aliaj lingvoj estu tradukitaj nur Esperanten.

3. — La Kongreso ĝoje eksciis, ke 35 pacifistaj societoj informis la Internacian Oficejon, ke ili estas pretaj korespondi per Esperanto. Ĝi konsilas tian ekzemplon al la aliaj societoj kaj esprimas la deziron, ke en la estonteco tiuj societoj, kiuj korespondas per Esperanto, estu presataj kun steleto en la organoj de la paca movado.

D-ro Molenaar protestas kontraŭ la pretendo de Esperanto, kiu volas esti la internacia lingvo. Esperanto kontraŭstaras la lingvosentojn de l'okcidentaj popoloj. Li elmetas la jenan proponon:

La demando pri lingvo internacia ne povas esti konsiderata kiel solvita, tiel longe kiel la plej gravaj kulturlandoj ne decidiĝis por la alpreno de unu el la ekzistantaj internaciaj lingvoj kaj la solvo de tiu problemo trovis sufiĉan nombron da partianoj. La Kongreso decidas preferi neniun el la ekzistantaj artefaritaj helplingvoj.

S-ro Moch, el Parizo, parolas por Esperanto. P-ro D-ro Förster, el Berlino, kontraŭ la propono Molenaar; P-ro Quidde kontraŭstaras al la akcepto de la 2a rezolucio. Rillsson, el Stockolm, parolas por la franca lingvo kiel kongreslingvo. D-ro Molenaar resumas sian proponon: La Kongreso restas neŭtrala kontraŭ ĉiuj·

Tiu propono estas *rifuzita*. La tri proponoj de la komisiitaro estas *akceptitaj*. En la rezolucio 2a la fina frazo estas strekita.

(El *Frankfurter Zeitung*.

Internacia Unuiĝo de la Studentoj (I. U. S.)

Oficiala Informilo

Okaze de la Tria kongreso, la komitato de la Tria aranĝis specialan kunvenon por la studentoj en la nomo de la « Internacia Unuiĝo de la Studentoj » (I. U. S.). Bedaŭrinde neniu komitatano de ĉi tiu « I. U. S. » povis ĉeesti la kongreson. Nur unu membro de la Unuiĝo, S-ro Blicher, el Kopenhago ĉeestis la kunvenon kun dudeko da studentoj de diversaj nacioj ĉeestantaj la kongreson.

Jen estas la oficiala raporto, kiun ili akceptis, pri la kunveno.

Cambridge, 14 Aŭgusto 1907.

« Kelkaj studentoj de diversaj nacioj kunvenis « hodiaŭ en la Patologiejo. S-ro Rauch, la plej « maljuna al la ĉeestantoj, malfermis la kunve- « non, raportis kelkajn vortojn pri la celo de la « Internacia Unuiĝo de la Studentoj », kaj invitis « la ĉeestantojn eniri la I. U. S. Li proponis « sendi raporton al la Internacia Unuiĝo, kion « oni akceptis. Je la fino, S-ro Rauch petis la « ĉeestantojn propagandi kiel eble plej multe « inter la studentaro. Mallonga raporto estis sen- « dita al la Komitato de la Kongreso ».

Je la nomo de l' « I. U. S. » mi dankas ĉiujn studentojn, kiuj ĉeestis la kunvenon. Mi dankas precipe S-ron Rauch, kiu bonvolis malfermi la kunvenon kaj paroli multe pri nia celo.

A. Vincenneux
Sekretario de l' « I. U. S. »
Interna Repetitoro, Lycée de Troyes,
(Aube, Fraucujo).

***

Laŭ la propono de la sekretario, la komitato de l' « I. U. S. » decidis nomi D-ron Zamenhof kaj S-ron Rektoron Boirac, kiel « Honoraj Prezidentoj » de la « Internacia Unuiĝo de la Studentoj ». Nedube estas ke D-ro Zamenhof, nia komuna patro, kaj S-ro Boirac, Rektoro de la Dijon'a Akademio, memorante sian studentan vivadon, bonvolos akcepti ĉi tiun oficon, kaj donos al nia afero la aprobon kaj la helpon necesajn.

ANONCETOJ

Kosto. 8 spesdekoj (20 centimoj, 2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

« Saturday Evening Tribune », la plej granda grava amerika ĉiusemajna jurnalo socialista, deziras esperantistajn korespondantojn en ĉiu lando pri la labora kaj socialista movadoj. Redone oni sendos la jurnalon. (En ĉiu No esperanta artikolo). Sin turni al Ch.-E. Randall, 1522 First Ave., Seattle, Wash. U. S. A. (Unuiĝitaj Statoj).

Paris (Francujo). — S-ro Michaud, 13 Avenue de Saint-Mandé, tre deziras korespondi kun *inĝenieroj* pri konstruo de pontoj, tunelaj, fervojoj k. d. p. Li respondos al demandoj pri la Pariza Urbfervojo.

La Guardia (Jaén-Hispanujo). — S-ro S. Baudin Agüero deziras korespondi kun ĉiulandaj *geinstruistoj* pri *pedagogio*.

Taillette-Rocroi (Ardennes-Francujo). — S-ro Heripret deziras korespondi pri *vivado de terlaboristoj* kun *svedoj* kaj *anglo*j.

Martinsberg (Aŭstrujo). — S-ro Thalinger deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Voiron (Isère-Francujo). — F-ino Jullien multe deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

Bobrov. (gub. Voronej-Rusujo). — S-ro Voldemaro Maksimov, petegas ian *oficon alilandan*. Finis Uuiversitat. jurist., *scias* Esperanto, lingv. franc., grek., latin., nemulte angl., german., kaj fotografarton.

Angers, (France)· — S-ro Georges, 9 rue des Doëliers, interŝanĝas poŝtkartojn (vidajojn kaj kostumojn); ĉiam respondos per plej belaj poŝtkartoj de vidindajoj.

Dresden-N. (Germanujo). — S-ro H. Bär, Wiesentorstr. II, deziras interŝanĝi vidajojn, leterojn kun gesamideanoj. Mi estas filateliisto.

London (Anglujo). — H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Town, deziras aĉeti: *La Esperantisto*, 1889 ĝis 1895, jarkolektojn aŭ eĉ apartajn numerojn. Ankaŭ *Lingvo Internacia*, jarkolektojn nebinditajn, 1897, 1899. Ankaŭ deziras ricevi po unu ekzemplero de sekvantaj: *Espérantiste Canadien, Kalejdoskopo de Esperantistoj, L'Espérantiste* (Aldono al Grand Sténographe, 1896), *La Stenografiisto, L'Esperanto*, (Nurnberg, 1889), *Mondlingvisto, Munĥena Esperantisto, Revue des Nations*. Ĉiu Grupo kiu eldonos novan gazeton estas petata sendi sciigon. *NE* deziras interŝangi poŝtkartojn ilus.

Falun (Svedujo). — S-ro Fr. Skog deziras korespondadi kun gesamideanoj el Italujo, Serbujo, Rumanujo, Grekujo, Ameriko (Krom U. S. A.), Afriko, Azio kaj Oceanio; ĉiam respondos.

Mons (Belgujo). — S-ro René Philippe, Chaussée de Rœulx 36, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn (vidajojn).

Poix (Somme-Erancujo. — S-ro L Bouvier, farmaciisto. Interesajn vidajojn de la 3a *Kongreso* mi sendos al ĉiuj samideanoj, kiuj ĝin petos, de mi per ilustrita poŝtkarto.

Bucarest (Rumanujo. — S-ro D-ro S. Kimel, kuracisto, strato Coltei 16, deziras korespondi kun gesamideanoj; ĉiam respondos.

Zürich (Svisujo). — Esperanta Eldonejo, Karl Jost. Jus aperinta: *Esperantista Kantaro*, 13 Kantoj originalaj aŭ esperantigitaj por 4 voĉoj miksitaj. Ricevebla de la supra eldonejo po 40 Sd.

Limoges (Francujo). — Esp. Konsulo: S-ro L. Lamant, bankoficisto, 36 Avenue du Pont-Neuf. Respondas senpage ĉiujn sciigojn pri la urbo kaj regiono. Oni nur aldonu poŝtmarkon por la respondo.

Davos-Platz (Svisujo). — F-ino Herzog, lingvoinstruistino, volonte kaj danke akceptus malnovajn Esp. jurnalojn el ĉiuj landoj kiel propagandilojn kaj ĉiam estas preta por doni kiajn ajn informojn pri Davos kiel kuracejo kaj sportloko; plie invitas ĉiujn gesamideanojn, kiuj vizitos Davos'on partopreni en la internaciaj kunvenoj de la Esperantista societo. Adreso: Zur Heimat lapud poŝtoficejo, *Davos-Platz*.

Billancourt (Francujo). — Albert Leblanc, route de Versailles, 60 bis, respondos ĉiujn poŝtkartojn, kiujn li ricevos.

Paris-16 (Francujo). — Maurice Douhine, rue Lemarois 49, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun alilandanoj.

Billancourt (Francujo). — A. Leblanc, laboristo tajloro, route de Versailles 60 bis, deziras korespondi kun ĉiulandaj laboristaj tajloroj.

Dijon (Francujo.) — S-ro J. Blagny. R. Louis Blanc, 8 deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun nefrancaj geesperantistoj ĉiam tum respondos.

Assencières (Aube, Francujo). — S-ro L. Gallois interŝanĝas poŝkartojn. Nepre respondos.

Kroniko Esperantista

Pri la Kembriĝa kongreso parolis tre multaj jurnaloj el ĉiuj landoj — kaj preskaŭ ĉiuj per tre favoraj vortoj. Tio ĉi montras, ke niaj kongresoj plene sukcesas montri kion ni al ĉiuj volas montri, nome ke nia afero ekzistas, ke nia lingvo vivas, ke nia movado fariĝas ĉiam pli grava kaj atentinda. En Britujo la impreso estis grandega kaj eĥon de tio ni retrovas en la viglaj diskutoj, malfermitaj en grandaj gazetoj, kiuj nun jam ne timas paroli pri Esperanto kaj fine konsideras ĝin kiel demandon seriozan, indan je tutmonda intereso. La fakto, ke eminentaj sciencistoj nun aliĝis ne nur teorie, sed aktive al Esperantismo, estas plej bona argumento por tiuj multaj personoj, kiuj rigardas al la supraj altajoj antaŭ ol pripensi mem kaj elmeti certan opinion. Antaŭe, la modo konsistis en tio, ke oni ĉion faris por ridindigi la Esperantistojn kaj entute la ideon de internacia artefarita lingvo; nun la modo fariĝas favora al Esperanto: la esperantistiĝemo estas io moda kaj bongusta jam en kelkaj landoj. Ni ĝoju pri tio, sed samatempe ni zorgu, ke nia movado ne dependu de tiuj variemaj fluoj de l'publika opinio, sed pli kaj pli enradikiĝu en nia vivo kaj kutimo.

Cetere, eĉ la plej moderaj devas konfesi, ke nia afero kreskas, kaj ĝi kreskas mirinde ne nur rilate al la nombro de siaj adeptoj, sed ankaŭ rilate al la nombro de la landoj, kiujn ĝi trapenetras. En la daŭro de kelkaj monatoj, Ameriko, en kiu Esperante estis io preskaŭ nekonata, fariĝis preskaŭ tiel agema kiel la malnova kontinento. Jam Unuiĝitaj Ŝtatoj invitis kongreson en sialanda urbo kaj la Braziloj, de nelonge varbitaj al Esperanto, jus havis nacian kongreson, ĉe kiu partoprenis pli ol mil diversurbaj samideanoj, inter kiuj la ministro de l'Internaj Aferoj kaj aliaj oficialaj personoj. Ne nur Ameriko, sed ankaŭ Azio venas al ni. Japanujo, Hindujo, enhavas jam multajn agemajn Esperantistojn kaj naciajn organojn; nova revuo naskiĝis en Insuloj Filipinaj, kie nia movado ekpenetras, kiel ankaŭ en la Holandaj kolonioj (Insulindo). Baldaŭ ne ekzistos loko de l'tero en kiu ne estos almenaŭ unu Esperantisto kaj tiam, kiam nia ideo havos partianojn en ĉiuj regionoj, ĝi neniam estos pereigebla aŭ malfortikigebla de ia ajn politika aŭ socia okazo, ĉar ĝi estos vere universala.

La kvara kongreso (oni jam parolas pri ĝi) do okazos en Germanujo, kredeble en urbo Dresdeno. Niaj Germanaj samideanoj, kies sindonemon kaj persistecon ĉiuj konas, sin de nun preparas por organizi kvaran sukcesan kongresegon. Oni ne devas malkonfesi, ke ilia tasko estos tre malfacila, ĉar Germanujo ankoraŭ skeptike rilatas al Esperanto, sed kun la helpo de ĉiuj Esperantistoj, dank'al la klopodoj, kiuj ĉiaflanke estos farataj dum tiu jaro, oni povas esti certa, ke la rezultato estos sukcesplena.

***

Denove dika aro de novaj eldonajoj. Firmo Hachette, kiu estas vere tre naskema, aperigis *Imenlago*, bela novelo de Th. Storm, trad. de A. Bader, el Germana lingvo, *Grekan* kaj *Italan* eldonojn de l'Fundamento kaj la jam de longe atenditan *Jarlibro Esperantista* de 1907; tiu utilega libro estas nun redaktita laŭ nova plano, dank'al kiu pli granda precizeco kaj konfidindeco estis atingitaj. *Espero katolika* eldonis (1a volumo) tre zorge tradukitan *Katolika Preĝaro* kiu tre utilos al katolikaj Esperantistoj por ilia propagando. La bonega respondo de S-ro P-ro Couturat al S-ro rektoro Diels, el Berlino, jus estis esperantigita kaj aperis ĉe Esperanto Verlag Möller et Borel, sub titolo: *Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri*. Ni konsilas la legadon de tiu verko al ĉiuj, ĉar ĝi estas lerta kaj trafa rebato al ofte dirataj argumentoj. Post S-ro Meier, S-ro K. Jost eldonis *Esperantista Kantaro*, tre bona libreto por Esp. kunvenoj. Inter la lerniloj ĉiam tro multaj por analizo mi citas *Lehrbuch*, de S-ro A. Nötzli kaj *Taschenwörterbuch* de D-ro Zamenhof; al la Germanoj do jam ne mankas la bonaj, ĉiametodaj lerniloj.

***

De profundis... la revuo en... Eŭropa lingvo (Idiom-Neutral iom reformita), kiu aperis en Bruselo sub titolo *Idei International* kaj fervore atakis esperanton jam ne aperas...

A. R.

Liverantoj de Mustardo kaj Amelo al la Reĝo
Laŭ privilegio
J. & J. COLMAN
MANUFAKTURISTOJ DE (Akcia Societo)
MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO
KAJ
BRITA RIZFARUNO
108, CANNON STREET, LONDON
kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando)

Signoj esperantistaj ĉiuspecaj:
Steloj verdaj, flagoj blankaj, el bona emajlo, dauremaj, bone fabrikitaj

Por societoj po 100 ekzempl. Fr. 24,00 riceveblaj ĉe
A. H. Rudolf, Reichenberg, Bohemujo.
Oni postulu prezaron specialan.

Plej bone ridas, kiu laste ridas

Duakta Komedio *(fino)*

AKTO 2ª

(La scenejo prezentas salonon, kie la invititoj atendas antaŭ ol iri en la manĝoĉambron).

SCENO 1ª.

L. — Kia gaja kunveno. Nun, vi povas pace ĝuadi vian tutan feliĉecon ĉar vi interkonsentis (*Oni sonorigas*). Sed kiu sonorigas ? Mi lasas vin momenton, mi aŭdas, ke la servistino diskutas ĉe la pordo kaj ŝi estas tiel malsperta... (*foriras*).

F. — Jen sukcesinta plano. Kaj ni ne trograndigis : Leono, vi estas geniulo.

A. — Plej bona geniulo, nia savinto.

Le. — Mi do estas fiera... ĉu vi pentas ?

F. — Min iom maltrankviligas la fino de tiu implikajo.

A. — Mi preferus, se ni ne bezonus tian ruzon ; ni nun devos ĉion konfesi kaj tio estos maldolĉa.

Le. — Mi ĉion prenos sur min, vi ne estas kulpaj. Ni trinkos al via sano, juna amanto, kaj la vico baldaŭ venos ; ĝi estos kvaropa edziĝo. *(oni aŭdas bruon ĉe la pordo).* Mi kredas ke venas kelkaj vizitantoj ; diablo ilin prenu...

L. — Envenu, envenu, sinjoro, amikoj, mi prezentas al vi mian nevon (*ŝi haltas por akcentigi ĉiun silabon*). Mia nevo Alkibiado.

Triope. — Ho ! Ha ! He !

Fremdulo. — Gesinjoroj, mi havas la honoron prezenti al vi miajn komplimentojn. (*Al la onklino*) Sed ili mute staras kvazaŭ frapitaj de monstrulo... aŭ ĉu ili mutiĝis ?

L. — Tion ili meritus, ĉar la terurego havas tiajn efikojn. Ha, jen vi havas belan kapon, gefriponoj. Nu, Arlinjo, diru bonvenan vorton al via kuzo Alkibiado kaj diru, ke vi...

A. — Ne, onklino, pardonu nin.

F. — Mi prenas sur min la tutan kulpon.

Le. (*al la onklino*). — Tio estas mi, sur kiun vi povas ŝprucigi vian pravan koleregon. (*al la fremdulo*). Pardonu, Sinjoro, ke mi tiel malbone salutas vin ; mortus du koroj, se ni ne venkus.

Al. — Ho, ĝi estas grava, sed kion vi parolas pri Esperanto... ĉu ĝi jam estus konata en tiu urbo, ĉu vi scias ĝin ; tio estus ĉarma, ĉar mi venas el alia fino de l'mondo kaj mi estus feliĉa, se ni povus nin kompreni reciproke.

L. — Tion mi volus vidi, sen trompajo, se vi volas, ke mi pardonu al vi, trompistoj.

A. — Onklino, mi certigas, ke mi tre bedaŭras.

L. — Vi nenion bedaŭras, kaj se via kuzo ekpetus pri via mano...

Le. (*al la fremdulo*). *Ha, sinjoro, vi venas tro malfrue ; ili estas gefianĉoj* (1).

Al. — *Ho, mi estas tre feliĉa, mi mem havas junan edzinon.*

F. saltas de ĝojo. — Li diras, ke li havas junan edzinon. Ho, neesperita bonŝanco, sed mi timegis.

Al. — *Do miaj amikoj, ni estas gesamideanoj.*

A. — Vi vidas, mia onklino, kian povon havas tiu helplingvo. Vi tuj permesos, ke mi eklernu ĝin.

L. — Mi vidas, ke vi jam ne scias, kion vi diras.

A. — Kaj vi ankaŭ eklernos ĝin.

L. — Mi, neniam ; tia estos via puno, ĉar vi tiel trompis min per via idiomo. Se vi estas tiel malsaĝa por lerni Esperanton, lernu ĝin. (*al sia nevo*). Sed ni petas, ke vi bonvolu juĝi gravan demandon : ĉu vi opinias ke pri edukado Esperanto povas anstataŭi la aliajn lingvojn.

Al. — Certe, ĝi estas bonega lingvo. Ke la personoj, kiuj havas nek tempon, nek okazon studi alian lingvon, tuj lernu Esperanton. Nuntempe, ili povos vojaĝi tra la tuta mondo kaj sin komprenigi ĉie ; por tio ili nur bezonos sin turni al la Esperanta Konsulejo en ĉiu urbo. Vi, mia onklino, devas nepre veni al ni.

(*Sur la scenejon alvenas juna fremdulino parolas al Alkibiado*). — *Ho, Alkibiado, mi sufiĉe longe atendis la finon de via parolo ; nun mi deziras esti prezentata al tiu societo ; ĉu vi diris al ili, ke mi lernis Esperanton nur por paroli kiun ili ?*

Al. — *Ho, jes, mia kara. Mi prezentas al vi mian edzineton* (*al sia edzino*) *ĉiuj parolas Esperante.*

Fremdulino. — *Efektive, mi aŭdis.*

L. *(al la publiko).* — Nu, al mi utilas miaj principoj kaj miaj lingvoj antikvaj kaj modernaj ; mi tute nenion komprenas. Mi devas fari ion : mi ankaŭ eklernu ĝin.

A. (*aplaŭdas*). — Jes, onklinjo, kaj tiam mi mem laste ridos !

Le. — Brave, ni havos novan idealistinon.

L. — Jes, sed la idealo ne nutras. Nun, ni iru en la manĝoĉambron. (*al Leono*) kaj vi proponu al mi vian brakon...

(*Ili formas tri parojn kaj ekmalaperas*).

Servistino. *(al Arlinjo).* — Jen, la ĝardenisto alportis al vi tiun bukedon.

F. (*salutante*). — Mia bukedo de fianĉiĝo...

(*Kurteno*)

S-ino HOURIET.

(1) La vortoj tiele skribitaj estas parolataj Esperante en la originalo.

TRA LA ESPERANTA LITERATURO

La kastelo de Prelongo (D-ro VALLIENNE). — La populara literaturo estas la plej efika rimedo por allogi al nia afero plej diversgradajn kaj diversdevenajn personojn, ĝuste ĉar ĝi elvokas sentojn, kiuj estas ĝenerale disvastigitaj kaj eksciteblaj, dum teknikaj verkoj pro sia specialeco interesas nur malgrandan malplimulton. Sendube pro tio, D-ro Vallienne, la konata tradukinto de jam multaj verkoj, verkis en Esperanto originalan romanon. *Originala ?...* Jes, tiu vorto estis ĝis nun ne ofta, kiam oni parolis pri Esperanta literaturo, sed tamen originalajn verkojn ni nepre bezonas, se ni volas ke ekzistu vera Esperanta literaturo. La romano de D-ro Vallienne (515 paĝoj da plenega teksto) apartenas al la speco nomata « romano populara », tio do signifas ke en ĝi oni trovos mirindajn kaj sinsekvajn aventurojn, terurajn dramojn, strangajn hazardojn, abomenindajn homojn kaj homoanĝelojn rekompencitajn post multegaj malfeliĉoj. Tio signifas ankaŭ, ke ni ne povas ĝin resumi, ĉar la agado, kvankam tre klare elmontrita de la aŭtoro, kvazaŭ de profesia romanisto, estas tro vasta, tro aventurplena por raporto. Nur la leganto ekscios kiaj estas la multegaj krimoj de la malestiminda Liŝnaro ; li ankaŭ ekscios kiom da superhomaj suferoj elportis fraŭlino de Prelongo, sur kiun la aŭtoro malavare disjetis ĉiujn virtojn, kiuj floras en la anĝelejo.

La lingvo de D-ro Vallienne estas facila, flua kaj lian libron oni legas rapide, kvazaŭ ĝi estus skribita nacie, tiom pli ke la aventuroj, de kiuj ĝi estas plenega, vin instigas al senhalta tralegado.

Faraono (trad. Kabe). — Jen aperis nova grava verko en nia Esperanta literaturo. *Faraono* estas la titolo de longa duvoluma romano de la fama Pola aŭtoro Prus. La agado havas lokon en Egipto, en la epoko de 20ª dinastio kaj la libro, pro siaj multaj kaj belegaj priskriboj de la antikva Egipta vivado, prezentas plej grandan intereson. La ĉefa persono de la romano estas la faraonido, ĉirkaŭ kiu grupiĝas la diversaj reprezentantoj de la tiama socia vivado, revivigita de la Pola aŭtoro ĝis ĝiaj plej etaj detaloj.

Mirinda estas la stilo de Kabe, tiu stilo, kiun ni jam admiris en liaj antaŭaj tradukoj : klara, simpla, flua, vivanta. Tiu traduko vere ne estas... traduko, tiom ĝi estas facile legebla kaj legante Kabe, oni penetras en la spiriton mem de Esperanto.

A. R.

LINGVA FAKO

Lingvaj Klarigoj

Ni tie ĉi plezure respondos ĉiujn demandojn gramatikajn, vortajn aŭ sintaksajn, kiujn sendos al ni niaj legantoj, kondiĉe, kompreneble, ke tiuj demandoj prezentu ĝeneralan intereson kaj celu punktojn ne tute elementajn.

Al S-ro R. S. Pri la radiko firm'. — La radiko *firm'* signifas efektive : 1e Komerca entrepreno (firmo) ; 2e io fortika, eltenema, certa. Sed tiu dusenceco kaŭzas en la praktiko nenian konfuzon, tiom pli ke en la unua senco la vorto estas plej ofte uzata substantive kaj en la dua adjektive. Plie, por la diritaj sencoj, tiu radiko estas la plej internacia kaj oni malfacile povus trovi alian.

Al S-ro L. M. Pri la sufikso **um**. — Laŭ D-ro Zamenhof, la sufikso *um* ne havas difinitan sencon kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun *um* oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Sekve, oni ne rajtas uzi *um* laŭvole post kia ajn vorto, se la senco de tiu *uma* vorto ne estas difinita per la vortaro. Jen la ĉefaj vortoj kun sufikso *um : aerumi, akvumi, brulumo, buŝumo, butonumi, datumi, gustumi, kalkanumo, kolumo, komunumo, kruciumi, laktumo, lekumi, lotumi, malvarmumo, manumo, martelumi, mastrumi, nazumo, palpebrumi, partumo, plenumi, proksimuma, sapumi, ventumi.*

H.

EKZERCETOJ

La Vizito

Iu frapas ĉe la pardo. Iu sonorigas. Mi atendas viziton de S-ro L. Iru vidi, kiu frapas.

Estas gesinjoroj L. kun ilia juna filo.

Bonan tagon, sinjoro, kiel vi fartas ?

Tre bone, mi dankas. Jam de longe ni ne havas la plezuron vin vidi.

Ni havis multe da aferoj, kiuj malpermesis tian viziton.

Kiel fartas nun fraŭlino via fratino ?

Si fartas nun pli bone ; la kuracisto certigas, baldaŭan plenan resaniĝon.

Sidiĝu vin, gesinjoroj, mi petas.

Ni dankas vin ; ni ne intencas resti pli longe.

Kial do ? ĉu vi ne povas tagmanĝi kun ni.

Ni bedaŭrinde ne povas hodiaŭ, ĉar ni akceptis inviton de nia onklino.

Mi esperas, ke vi baldaŭ revenos viziti nin.

Demetu viajn mantelojn, ĉar estas tre varme tie ĉi.

Estas necese ke ni nun foriru.

Mi tre dankas vin pro via afabla vizito.

La plezuro estis por mi ; ĝis la revido, sinjoro.

Bonan tagon, gesinjoroj ; bonvolu saluti ĉiujn viajn familanojn en mia nomo.

Komercaj Leteroj

Peto pri prezaro. Torino, la 4an de Aprilo 1900.

Per poŝto revenanta volu al mi sendi vian plej novan prezaron. Mi baldaŭ bezonas viajn artikolojn, kaj se la prezoj estos al mi konvenaj, m sendos al vi mian mendon.

Vin salutas· P.

Respondo Praho, la 10an de Aaprilo 1900.

Ni havas la honoron sendi al vi per ĉi tio nian plej novan prezaron, kiun ni rekomendas speciale al via afabla atento. Ni esperas, ke la prezoj plej malalte notataj vin igos doni al ni viajn mendojn por ĉi-tiu sezono. Estu certa, ke ni ĝin plenumos plej akurate.

Kun respekto, R.

Kvitanco. Monako, 10an de Majo 1898.

Ni certigas per tio ĉi, ke ni ricevis de Sinjoro S. Berahard en Berlin la sumon da 1000 markoj (500 Sm), mono de Germanujo, kiun ni pruntis al li laŭ lia ŝuldatesto de l'4ª de Januaro de tiu ĉi jaro. Fratoj Müller.

Asigno. Lausanne, la 15an de oktobro 1901.

Bona por Fr. 2500 (1000 Sm.)

En fino de nuna monato, pagu por tiu ĉi asigno, laŭ ordono de S-ro Ureil, la sumon da dumil kvin cent frankoj (mil Sm), valoro ricevita mone, kiun vi metos en konton laŭ avizo de Neŭmann.

Kambio. Rouen, la 15an de Decembro 1901.

Bona por funt st. 372 (3720 Sm).

Post (aŭ ce) vido, pagu por tiu ĉi unua kambio, laŭ ordono de S-ro Moore la sumon da tricent sepdek du funtoj sterl. (tri mil sepcent dudek Sm), valoro per komercajoj, kiun vi metos en mian konton laŭ avizo de A. Nicolas.

(El *Komercaj Leteroj*, de P. Berthelot & Ch. Lambert).

FELIETONO DE " ESPERANTO " 1

LA SABLA HOMO

el E. T. A. HOFFMANN

(trad. A. R.)

NATHANAEL AL LOTHAR

« Certe vi ĉiuj estas tre malkvietaj, ke mi de tiel longe, longe ne skribis. Patrino koleras kaj Clara povas kredi, ke mi tie ĉi vivadas en bruado kaj tumultado, kaj tute forgesas mian anĝelbildon, tiel profunde enstampitan en mia koro kaj sento Sed ne estas tiel ; ĉiutage kaj ĉiuhore mi pensas al vi ĉiuj kaj en dolĉaj songoj sin prezentas al mi la amika formo de mia ĉarma Clara kaj ŝi al mi ridetas alloge per siaj helaj okuloj ! Ha, kiel mi povus skribi al vi, en tiu mia terura stato spirita, kiu ĝis nun konfuzis ĉiujn miajn pensojn ! — Io teruriga enloĝis mian vivon ! Mallumaj antaŭsentoj pri malbelega, minacanta fatalo sin etendas super mi kiel nigraj nubombroj, nepenetreblaj de ia amika sunradio. Nun mi devas diri al vi, kio okazis al mi. Mi devas, tion mi konfesas, sed nur pensante, ke vi ridos min kiel frenezulon — Ha, mia kara Lothar ! kiel mi komencos sentigi al vi, ke tio, kio al mi okazis antaŭ kelkaj tagoj, povis tiel konfuzi mian vivon ! Se vi estus tie, vi povus mem vidi, sed nun vi certe rigardas min kiel sensencan viziulon — Mallonge, la dirita terurajo, kies mortigan impreson mi vane penas forpeli, konsistas en tio, ke antaŭ kelkaj tagoj, nome la 30an de Oktobro, tagmeze je la dekdua, vendisto de barometroj, envenis mian ĉambron kaj proponis al mi sian negocajon. Mi nenion aĉetis kaj minacis lin forjeti en la ŝtuparo — kion li mem cetere evitis per forkuro. — Vi suspektas, ke nur propraj spertoj, profunde enradikigitaj en mia vivo, povas doni ian signifon al tia okazintajo, ke la persono de tiu malfeliĉa vendisto elvokas en mi tre malamikan impreson. Tio estas vera. Mi penos trankvile kaj pacience rakonti al vi pri mia frua infaneco tiom multe, ke al vi ĉio aperos klara kaj komprenebla. Dum mi komencas, mi aŭdas vin ridanta kaj Clara'n diranta : tio ja estas infanajoj ! — Ridu, mi petas, ridu min el tuta koro ! — mi petegas vin ! Sed, je Dio ! la haroj stariĝas al mi kiam mi pensas pri tio. — Nun al la afero !

« Escepte dum la tagmanĝo mia fratino kaj mi nur malmulte vidis nian patron. Li estis tre okupita per sia ofico. Post la vespermanĝo okazanta je la sepa, laŭ la malnova kutimo, ni iris ĉiuj kun la patrino en la laborĉambron de la patro kaj eksidis ĉirkaŭ ronda tablo. La patro fumadis tabakon kaj trinkadis grandan glason da biero. Ofte, li rakontadis al ni multajn strangajn historiojn kaj tiam li havis tian fervoron, ke li ellasis la pipon, kiun mi devis rebruligi — kio por mi estis la ĉefa plezuro. Ofte li donis al ni bildlibrojn, mute kaj rigide sidadis sur sia apogseĝo kaj forblovadis la fumnubojn, en kiuj ni naĝadis. En tiaj vesperoj, la patrino estis tre malgaja kaj apenaŭ batis la naŭa horo, ŝi diris : Nu, infanoj ! al la lito ! al la lito ! la sabla homo venas, mi jam vidas lin. Vere, mi poste aŭdis ĉiufoje pezan, malrapidan paŝadon en la ŝtuparo ; tio devis esti la sabla homo. Iam, tiu paŝado kaj bruado estis al mi aparte teruraj ; mi demandis la patrinon, dum ŝi nin forkondukis : He, panjo ! Kiu do estas la malbona sabla homo, kiu ĉiam nin forpelas de paĉjo ? Kiel li elŝajnas ? — « Ekzistas nenia sabla homo, mia kara infano, respondis la patrino ; kiam mi diras : la sabla homo venas, tio simple signifas, ke vi bezonas dormi kaj vi jam ne povas malfermi la okulojn, kvazaŭ oni enŝutus al vi sablon ». La respondo de la patrino min ne kontentigis ; en mia infana spirito estis tre klare la penso, ke mia patrino malkonfesis pri la sabla homo, por ke ni ne timu lin ; mi ja ĉiam aŭdadis lin supreniranta sur la ŝtuparo. Plena de scivolemo pri tiu sabla homo kaj liaj ecoj, mi fine demandis la maljunan virinon, kiu vartadis mian fratineton : Kiel estas tiu sabla homo ? — He, ŝi respondis, ĉu vi ne ankoraŭ scias ? Tio estas malbona homo, kiu venas al la infanoj kiam ili ne volas iri en la liton kaj ŝutas al ili en la okulojn plenmanojn de sablo, tiel ke ili estas blindigataj ; li poste jetas ilin en la sakon kaj kunportas en la duonlunon por siaj infanetoj ; ili poste sidas en nesto kaj havas kurbajn bekojn, per kiuj ili trapikas la okulojn de la malsaĝaj homidoj ».

Terure pentriĝis en mia spirito la bildo de la kruela sabla homo ; tuj kiam vespere ekbruis sur la ŝtuparo, mi ektremis de maltrankvilo kaj teruro. Inter miaj larmoj, mia patrino povis eltiri nur tiun balbutan vokon : la sabla homo ! la sabla homo ! Mi poste kuris en la dormoĉambron kaj dum la tuta nokto min turmentadis la teruriga apero de l'sabla homo. — Kiam mi estis iom malpli juna, mi komprenis, ke la historio pri la sabla homo kaj lia infannesto en la duonluno, laŭ tio, kion rakontis al mi la vartistino, estis ne tute ĝusta ; tamen la sabla homo ĉiam estis al mi timiga fantomo, kaj timego — teruro min kaptis, kiam mi vidis lin ne nur supreniranta sur la ŝtuparo, sed forte malfermanta la ĉambropordon de mia patro kaj aŭdis, ke li eniras. Kelkan tempon li restis for, poste li sinsekve venadis· Tio daŭris unu jaron, kaj mi ne povis kutimigi min al tiu malĝojiga fantomo ; ne paliĝis la bildo de l'terura sabla homo. Liaj rilatoj kun mia patro ĉiam pli-kaj-pli okupadis mian fantazion : demandi la patron pri tio mi ne kuraĝis pro nevenkebla timemo, sed la deziro esplori mem la sekreton, vidi la fabelan sablan homon ĉiam plikreskadis kun la jaroj. La sabla homo min delogis sur la kampon de l'mirindajoj kaj terurajoj, kiuj tiel facile ennestiĝas en la infanaj spiritoj. Nenio estis al mi pli agrabla ol aŭdi aŭ legi historiojn pri koboldoj, sorĉistinoj, pigmeoj, k. a. ; sed ĉiam ĉe la unua vico staris la sabla homo, kiun mi desegnis per kreto kaj karbo ĉie sur la tabloj, ŝrankoj kaj muroj, kun la plej strangaj kaj teruriĝaj formoj.

(*Daŭrigota*).